Virino estis pulvopafita en Mineapolo

7-an de januaro, 2026

La ministrejo pri hejmlanda sekureco raportis, ke virino estis pulvopafita de agento de la Enmigrada kaj Dogana Efikado de Usono en Mineapolo kaj mortis, lastan merkredon. Hejmlandaj oficistoj priskribis la pulvopafon kiel faro por sindefendo, kvankam la guberniestro de Minesoto Tim Walz kaj la urbestro de Mineapolo Jacob Frey malkonsentis pri ĉi tiu raporto.

La parolanto de la ministrejo pri hejmlanda sekureco Tricia McLaughlin sciigis, ke la pulvopafo okazis dum "sindefendaj pulvopafoj" kiel kontraŭago al la atenco kontraŭ agentoj per la aŭto de la virino. La sekretario de la hejmlanda sekureco diris, ke la konduto de la virino estis "hejmlanda terorisma ago".

La okazaĵo estis aktive esplorata. Walz diris, ke la ŝtato estis laboranta por pliigi la scion pri tiu, kaj li demandis al la loĝantoj por resti trankvile. Laŭ la ABC News, Jacob Frey, la urbestro de Mineapolo, diris per raporto la jenon: li sciis pri la pulvopafo kaj urĝis la foriron el la urbo al la agentoj. Li sciigis, ke la partopreno de la enmigradaj federaciaj agentoj estis "kaŭzanta ĥaoson en la urbo". Dum konferenco, li disputis pri la uzo de la aŭto de la virino kiel armilo kontraŭ la agento.

This article is a translation of “Homeland Security says Minneapolis woman shot by ICE officer dies” by Wikinews contributors, originally published on Wikinews.
Source:
https://en.wikinews.org/wiki/Homeland_Security_says_Minneapolis_woman_shot_by_ICE_officer_dies
Licensed under Creative Commons Attribution 2.5 (https://creativecommons.org/licenses/by/2.5/)
This translation was made by Eduardus-eo. Any errors in translation are my own.